

## KION NI FARU .....?

*'Kio malhelpis min baptiĝi?' (Agoj 8:36)*

### La Problemo

Kiam Dio kreis la unuan homon Adam, kaj metis lin en belega ĝardeno, li donis al li nur unu simplan ordonon: *'de la arbo de sciado pri bono kaj malbono vi ne manĝu, ĉar en la tago, en kiu vi manĝos de ĝi, vi mortos'* (Gen.2:17). Kiel ni scias, Adam malobeis kaj pro tio meritis la punon - morto. Kvankam li kaj Eva ne tuj mortis, tamen ili kaj ĉiuj iliaj posteuloj fine mortis, kaj neniu povas eviti tiun sorton. Ĉu riĉa, ĉu malriĉa, ĉu saĝa, ĉu malsaĝa, ĉu bona, ĉu malbona - nek unu homo kapablas sin savi el la morto. Ĉu Dio malsukcesis sian celon plenumi la teron de la agnosko de sia gloro? (Hab.2:14) Nepre ne!

### La Solvo

Dio donis al la homoj vojon de savo, sed pro tio, ke li deziras nian amon, li ne devigas nin akcepti ĝin; amo ne povas esti devigita. Ni havas liberan volon, tial ni povas elekti ĉu aŭ ne ni akceptos lian proponon. Dio amas nin kaj volas, ke ni estu savitaj: *'... Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidis al li ne pereu, sed havu eternan vivon.'* (Jn. 3:16)

Tio montras, ke la vojo de savo estas la Sinjoro Jesuo Kristo, la amata filo de Dio, la sola homo, kiu neniam pekis. Li diris: *'mi estas la vojo ... neniu venas al la Patro krom per mi.'* (Jn. 14:6) La apostolo Petro tion konfirmis: *'... ne estas sub la ĉielo alia nomo ... per kiu ni devas esti savitaj.* (Ag. 4:12) Jen do nia savilo; kiel ni ĝin ektenu? Je la Pentekosta tago tiuj, kiuj aŭdis la parolon de Petro, agnoskante, ke il kulpis pri la morto de sia Mesio, ekkriis *'Kion ni faru ...?'* (Ag.2:37) La respondo estis klara: *Ekpentu, kaj baptiĝu ĉiu el vi en la nomo de Jesuo Kristo por forigo de pekoj ...'* (v.38) Pentu signifas ŝanĝi la direkton kaj iri laŭ alia direkto, tio estas ŝanĝi la pensojn kaj sintenojn, kiuj kontraŭas Dion, kaj fariĝi homoj, kiuj agnoskas sian pekemecon. Tiun ŝanĝon oni montras per la ago de baptiĝo.

Ĉu tiu ordono de Petro aplikiĝis nur al tiuj Judoj, kiuj aŭdis lin je tiu tago, aŭ al ĉiuj homoj? Tralegado de la sekvantaj ĉapitroj de La Agoj montras sen ia dubo, ke ĉiuj, kiuj ekkredis al Jesuo Kristo tuj baptiĝis:-

2:41 - *'... tiuj do, kiuj akceptis lian parolon baptiĝis ... en tiu tago ...'*

8:12 - *'... kiam ili (Samarianoj) kredis ... la evangelion pri la regno de Dio kaj la nomo de Jesuo Kristo, ili baptiĝis. viroj kaj virinoj.'*

8:35 - 38 - *'... Kio malhelpas min baptiĝi? ... kaj li baptis lin.'*

9:18 - *'Saŭlo ... leviĝis kaj baptiĝis ...'*

10:48 - *'Petro ... ordonis, ke ili (Kornelio kaj liaj parencoj) baptiĝu en la nomo de Jesuo Kristo.'*

16:15 - *'Lidia .. estis baptita, kun sia familio ...'*

16:33 - la malliberejestro *'baptiĝis senprokraste, li kaj ĉiuj liaj domanoj.'*

18:8 - *'Krispo ... kredis ... kune kun ĉiuj siaj domanoj; kaj multaj Korintanoj ... kredis kaj baptiĝis.'*

19:5 - Disĉiploj de Johano la baptisto, kiam ili aŭdis pri la Sinjoro Jesuo, *'baptiĝis en la nomon de la Sinjoro Jesuo.'*

22:16 - rakontante pri sia konvertiĝo, Paŭlo diris, ke Ananias diris al li *'kial vi prokrastas? leviĝu, kaj baptiĝu, kaj forlavu viajn pekojn ...'*

Ne povas esti ia dubo, ke tiuj, kiuj en la komenco aŭdis pri la evangelio kaj ekkredis ĝin, rekonis la urĝan neceson esti baptitaj, kaj nenie en la Biblio troviĝas iu ajn kontraŭa ordono.

### **Kia estas la bapto?**

Estas klare, ke en la unua jarcento bapto estis ĉiam per tuta subakviĝo. La vorto en la originala greka lingvo devenas de la tinktura industrio, kie la ŝtofo devas esti tute subigita en la tinkturan solvaĵon por ke la tuto ricevu la koloron. Tial la unuaj Kristanoj eĉ ne pensus pri la posta kutimo de ŝprucigado, kiu anstataŭigis subakviĝon.

\* Kiam Johano baptadis li estis *'en Enon ... ĉar estis tie multe da akvoj'* (Jn.3:23), kiu ne necesus por nura ŝprucigado.

\* Jesuo, post lia bapto *'... supreniris tuj el la akvo ...'* (Mt.3:16)

\* kiam Filipo baptis la eŭnukon *'... ili ambaŭ malsupreniris en la akvon ...'* (Ag.8:38)

\* Paŭlo klarigis, ke bapto simbolas enterigon: *'Ni ... estas entombigitaj kun li (Jesuo Kristo) per bapto ...'* (Rom.6:4); *'... enterigite kun li en bapto ...'* (Kol.2:12)

La uzo de kelkaj gutoj de akvo neniel akordas kun tiuj ekzemploj kaj signifoj, kaj neniu havas la rajton ŝanĝi tian gravan ordonon.

### **Ĉu vere necesas baptiĝi?**

Kiam Johano baptadis antaŭ la komenco de la predikado de la Sinjoro, tio estis por penti kaj la forlavado de pekoj. Nature kiam la Sinjoro Jesuo mem venis por baptiĝi, Johano protestis, sciante, ke tiu *'Ŝafido de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo ...'* (Jn.1:29) ne havas iujn ajn pekojn pri kiuj penti. Tamen Jesuo insistis, dirante *'Lasu do, ĉar tiel decas al ni plenumi ĉian justecon.'* (Mt.3:15) Tiel ni komprenas, ke la Sinjoro faris tion kiel ekzemplo por ni. Se tiu, kiu neniam pekis tamen baptiĝis, kiom pli necesas, ke ankaŭ ni, kiuj ĉiuj pekas, baptiĝu. Plie, tiu bapto ne sufiĉis por eterne savi la volontulojn; kiel Paŭlo klarigis al iuj disĉiploj en Efeso, kiuj sciis nur tiun bapton de Johano, necesas baptiĝi *'en la nomon de la Sinjoro Jesuo.'* (Ag.19:1-5) Tiuj disĉiploj tuj denove baptiĝis ĉar sia unua bapto ne estis en la nomo de Jesuo. Klare ne estas iel malĝusta esti rebaptita.

Al Nikodemo Jesuo diris, *'... Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio*, kaj kiam Nikodemo ne komprenis, Jesuo klarigis emfaze *'Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio.'* (Jn.3:1-5) Antaŭ ol li lasis la disĉiplojn Jesuo ordonis ilin prediki la evangelion al la tuta mondo dirante, ke *'kiu kredas kaj estos baptita, tiu estos savita ...'* (Mk.16:15-16)

Iuj homoj demandas ĉu vere necesas laŭlitere subakviĝi ĉar Dio scias niajn pensojn, Li jam scias ĉu ni kredas. Multaj ekzemploj montras, ke ja gravas obei la ordonojn de Dio kaj, ke Li punos tiujn, kiuj rifuzas. Ĉu la unua peko de Adam, pro kiu ni ĉiuj mortas, ne estis simpla malobeo? Jen pluaj

ekzemploj:-

Gen.22:18 - Dio promesis benon al Abraham kaj ĉiuj popoloj '*pro tio, ke vi obeis Mian voĉon.*'

Eliro 19:5 - Dio promesis, ke la Izraelidoj '*estos mia amata propraĵo*' se ili obeos.

Readmono - enhavas multajn petegojn, ke la nacio obeu, kaj avertojn de teruraj punoj se ili rifuzos, ekz. ĉapitro 28

1Sam.15:22 - Samuel diris al Saul '*Ĉu bruloferoj ...estas tiel agrablaj al la Eternulo, kiel la obeado ... ?  
obeado estas pli bona ol buĉofero ...*'

En tiu ekzemplo de Saul oni supozus, ke plaĉus al Dio se li donus buĉoferon, sed ne; pli gravas obei. La temo daŭras tra la tuta historio, kaj ĉiuj profetoj avertis, ke Dio punos la nacion pro ties malobeo.

En 2 Reĝoj 5 troviĝas rakonto pri leprulo Naaman, kiu iris al la profeto Eliŝa por peti kuracon. Eliŝa ordonis lin lavi sin sep fojojn en la rivero Jordan, sed tio ne plaĉis al la fiera Naaman. Li ekkoleris kaj demandis ĉu li ne povas sin lavi en la pli bonaj riveroj en sia propra lando. Ĉu vi supozas, ke lavado en tiuj riveroj fakte forigos la lepron? Tute ne! Nur kiam la servistoj persvadis lin obei la profeton, Naaman humiliĝis kaj sin lavis laŭ la ordono, kaj ne ĝis la sepa fojo, li estis resanigita. Kio do, malhelpis vin baptiĝi? Ĉu fakte la fiero kiel Naaman?

En unu parabolo Jesuo montris la neceson veni al Dio laŭ la ĝusta vojo: '*Sed la reĝo, enveninte por rigardi la gastojn, tie vidis viron, kiu ne havis sur si edziĝofestan veston .... Ligu lin mane kaj piede, kaj elĵetu lin en la eksteran mallumon ...*' (Mt.22:11-14). Ne gravas kiom da mirindaĵoj la homoj faras, ne gravas kiel sincere ili pretendas ami Dion, se ili ne obeas eĉ tiun simplan ordonon, la reĝo diros al ili '*Mi neniam konis vin; foriĝu de mi, vi farantoj de maljusteco.*' (Mt.7:21-23) Nepre necesas memori, ke homoj ne meritas aŭ rajtas pardonon kaj savon, tial neniu povas postuli ian ajn ŝanĝon al la vojo, kiun Dio tiel favorkore proponas.

### **Kiu devas esti baptita?**

Multaj eklezioj instruas, ke infanoj devas esti baptitaj; iuj eĉ subakvigas bebojn trifoje. Sed tiu kontraŭas la ordonon de la Sinjoro, ke tiu, kiu kredas baptiĝu (Mk.16:16). La Biblio ne donas eĉ unu ekzemplon de infana bapto. Fakte tiu kutimo sekvis la malpravan doktrinon, ke la homo posedas senmortan animon. Se oni kredas tion, necesas decidi pri kio okazas al tiu 'animo' post la morto. Se nur la piuloj eniros la regnon de Dio, kien iras la malpiuloj? Pro tio la pagana ideo de senfina turmento en 'Ŝeol' eniris la popularan kredaron, kaj nature tiu kaŭzas la problemon de infanoj, kiuj mortas sen bapto. Ne estus ĝusta puni ilin, tial la kutimo bapti ilin komenciĝis. Tiamaniere unu malprava ideo kondukas al alia. Almenaŭ evidentiĝas, ke la frua eklezio taksis tre grava la bapto. Petro skribis, ke la bapto estas '*la demando de bona konscienco al Dio ...*' (1Pet.3:21). Tio ne povas rilati al eta infano. Tial la bapto efikas nur por tiuj, kiuj kredas, kiel ĉiuj ekzemploj jam cititaj el La Agoj montras.

### **Kio estas la signifo de bapto?**

La simpla signifo estas, ke la bapto simbolas la forlavadon de pekoj: Ag.22:16; 1Kor.6:11;

Heb.10:22; kaj aliaj, sed ni jam konstatis, ke tio ne sufiĉas. Plia signifo estas kiel simbola morto kaj

releviĝo; morto al la antaŭa vivmaniero kaj releviĝo al nova vivo: Rom.6:1-7; 7:6; Efes.4:22-24 kaj aliaj. Sed la plej grava signifo estas, ke tiu nova vivo estas en Kristo. Per bapto ni '*surmetas ... Kriston.*' (Gal.3:23-29) La apostoloj multon skribis pri tio:-

*'Se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo ...'* (2Kor.5:17)

*'... vi estas levitaj kun Kristo ... ĉar vi mortis, kaj via vivo kaŝiĝis kun Kristo en Dio ... vi jam formetis la malnovan homon ... kaj surmetis la novan ... Kristo estas ĉio kaj en ĉio.'* (Kol.3:1-11)

*'... se ni jam kuniĝis al la simileco de lia morto, ni tiel same kuniĝos al la simileco de lia releviĝo, sciante, ke nia malnova homo estas kun li krucumita ... se ni mortis kun Kristo, ni kredas, ke ni ankaŭ vivos kun li ... vi vin kalkulu mortintoj al peko, sed vivantoj al Dio en Kristo Jesuo.'* (Rom.6:5-11)

*'... enterigite kun li en bapto ... vi mortis kun Kristo ...'* (Kol.2:12, 20)

*'... kun Kristo mi krucumiĝis, tamen mi vivas; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi ...'* (Gal.2:20)

*'... tiuj, kiuj apartenas al Kristo Jesuo, jam krucumis la karnon ...'* (Gal.5:24)

Ĉu vortoj povus esti pli klaraj? Se ni deziras esti 'en Kristo', nepre necesas baptiĝi.

## **Naskita el la Spirito**

Tamen la subakviĝo mem ne signifas ion ajn krom se la baptito komprenas, kredas kaj sincere klopodas obei la Sinjoron Jesuon. Ne estas io speciala aŭ magia pri subakviĝo; tio estus nura superstiĉo. Jesuo montris tion kiam li diris al Nikodemo, ke necesas esti naskita ankaŭ de la Spirito. Tio signifas la ŝanĝon en la homa koro, kiu devas akompani la komencon de la nova vivo en Kristo. Tial Petro skribis, ke la bapto ne estas nur '*la formetado de la karna malpuraĵo, sed la demando de bona konscienco ...'* (1Pet.3:21)

Kompreneble ni ankoraŭ pekadas post nia bapto, sed se ni restas 'en Kristo' kaj konfesas niajn pekojn, Dio pardonos nin. (1Jn.1:9) Se ni ne restas en Jesuo ni mortos kiel branĉoj fortranĉitaj de la vinberarbo: '*Mi estas la vinberarbo; vi estas la branĉoj ... se vi observas miajn ordonojn vi restados en mia amo ..'* (Jn.15) La apostolo Paŭlo rekonis kian batalon ni spertas kiam ni klopodas vivi laŭ la ordonoj de Dio, kaj li agnoskis, ke tio estas batalo, kiun ni ne povas gajni, kriante '*kiu min liberigos el la korpo de ĉi tiu morto?*' Responde li diris (kaj oni povas preskaŭ aŭdi la ĝojan malstreĉiĝon en la vortoj) '*Danko estu al Dio, per Jesuo Kristo, nia Sinjoro!*' (Rom.7:24-25)

## **Resumo**

- 1 - La neevitebla sorto de ĉiuj homoj estas la morto
- 2 - Dio proponis savon al tiuj, kiuj apartenas al la Sinjoro Jesuo
- 3 - Por aparteniĝi al Kristo oni devas kredi, penti kaj baptiĝi
- 4 - Bapto, estante simbolo de morto kaj releviĝo, kaj de forlavado de pekoj, devas esti per subakviĝo
- 5 - Necesas resti en Kristo per la strebo observi liajn ordonojn

\*\*\*\*\*

La mesaĝo de Dio en la Biblio estas la sama de la komenco al la fino, de Genezo al Apokalipso; estas nur du klasoj de homoj:

- la kredantoj, kaj la nekredantoj
- tiuj en Kristo, kaj la aliaj
- tiuj kun Noa en la arkeo, kaj tiuj ekstere, kiuj pereis en la inundo
- tiuj, kiuj obeis la ordonon meti sangon sur siaj fostojn kaj resti en siaj domoj, kaj tiuj, kiuj perdis siajn unuenaskitojn (Gen.12)
- tiuj, kiuj kredis Moseon kaj ekrigardis la kupran serpenton kaj restis vivaj, kaj la ceteroj, kiuj ne kredis, kaj mortis (Nom.21:5-9. Kp. Jn.3:14-15)
- tiuj irante laŭ la malvastigita vojo kondukanta al la vivo, kaj tiuj irante laŭ la vasta vojo kondukanta al la perejo (Mt.7:13-14)

Estas nia elekto decidi laŭ kiu vojo ni volas iri. Kiel Naaman ni ne povas nin savi per ia granda ago. La Sinjoro Jesuo jam faris tiun grandan agon per sia submetiĝo al la volo de Dio, eĉ ĝis la morto. Por ni nur necesas aparteni al Kristo per la simpla ago de bapto, tiam ni estos en la ĝusta rilato kun Dio, kiun Paŭlo priskribas: *'Ekzistas do jam neniam kondamno kontraŭ tiuj, kiuj estas en Kristo Jesuo. Ĉar la leĝo de la Spirito de vivo en Kristo Jesuo liberigis min de la leĝo de peko kaj morto.'* (Rom.8:1-2)

Jean Field